# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 01/12/2022 Sescentdekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 681,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **152,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **140,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **92,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

SENGLACIA ARKTA MARO INFLUAS VETERON

28-A DE NOVEMBRO 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*

## Du kredoj pri maskoj



Maskoj ne protektas vin aŭ aliulojn kaj daŭra uzado kaŭzas sanajn problemojn

Estis multegaj sciencaj studoj pri la temo dum jaroj kiuj montras la fakton.

Amike *Caroline Turner*

## Rainer Kurz revenos al Aŭstralio



Post dujara paŭzo pro KOVIM, mi nun finfine rajtas reveni al Aŭstralio. Mi atingos Sidnejon je la 2a de Decembro 2022 kaj planas resti por tri monatoj.

Lastjare mi povis eviti la malvarman sezonon en Germanio vizitante Sud-Kalifornion. Pere de kaliforniaj Esperantistoj mi trovis loĝejon apud San-Diego. Mi povis trovi multajn novajn (Esperanto-)amikojn en San-Diego. Mi vizitis ankaŭ Los-Anĝeleson (Hollywood, Beverly Hills, Venice Beach, Santa Monica, Malibu, Santa Barbara) kaj mi estis ankaŭ en Las Vegas kaj ĉe la Granda Kanjono.

Malgraŭ la agrabla tempo en Usono, mi nun povas konstati ke mi preferas Aŭstralion. Mi tre ĝojas baldaŭ revidi miajn amikojn, la Aŭstraliaj samideanoj. Kompreneble mi volonte denove deĵoros por la Esperanto-movado en Aŭstralio. Uzu min kiel Esperanto-varbilon!

*Rainer Kurz*

## La politiko de la mondo ŝanĝiĝas

*Roger Springer*

http://thesaker.is https://www.greanvillepost.com/
http://www.globaltimes.cn/index.html https://sputniknews.com/

Mi ne enmetas ligojn el la kapitalista mondo ĉar la ĉiutaga medio bone informas vin pri tio.

## Pri la supraj informoj

"Mi ne enmetas ligojn el la kapitalista mondo ĉar la ĉiutaga medio bone informas vin pri tio." Vi tute pravas. En multaj landoj de la kapitalisma mondo ekzistas liberaj amasmedioj, kiuj BONE informas. (Cedite, mi scias, ke ankaŭ ekzistas tabloidaj medioj, kiuj ne valoras la paperon, sur kiun la tekstoj estas presitaj. Oni devas elekti.) Bedaŭrinde la de vi montritaj adresoj plejparte liveras ŝtate kontrolitajn falsaĵojn. Amike, *Peter Weide*



Nur historio montros kiu mensogis aŭ ne. *Roger Springer*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.
La 3a de decembro estos la unua sabato. Ĉiuj bonvenotaj *Roger Springer*

## Martina Sachs-Bockelmann


Vizitanto al Aŭstralio

Kara Roger,
Mi momente estas en Tasmanio kaj kun plezuro renkontos vin kaj vian grupon komence de decembro se eblas. Kore, *Martins*




## 3ZZZ

. . La elsendo de la 28a de novembro invitas la aŭskultantojn viziti la belajn priskribitajn lokojn , donas ideojn pri kiel netrudeme informi pri Esperanto kaj petas pripensi la rolon de arĥivoj por konservi la memoron de nia historio



www.3ZZZ.com.au aŭ www.esperanto.com.au *Franciska Toubale*



# Skribu pri via klubo



## Per komuna letero publikigita lundon, The New York Times,



The Guardian, Le Monde, Der Spiegel kaj El Pais petis Usonon forigi la akuzojn pri Spionado-Leĝo kontraŭ Julian Assange ĉar ĝi subfosas gazetaran liberecon.
28/11/2022
HTTPS://WWW.TELESURENGLISH.NET/NEWS/MAJOR-OUTLETS-CALL-ON-THE-US-TO-DROP-CHARGES-AGAINST-ASSANGE-20221128-0009.HTML?UTM_SOURCE=PLANISYS&UTM_MEDIUM=NEWSLETTERINGLES&UTM_CAMPAIGN=NEWSLETTERINGLES&UTM_CONTENT=14

# Komencis paca solvo de la tajvana problemo.

## Tajvanaj lokaj elektoj diras ne al DPP-regado, alvokas pacon

La elektoj de la loĝantoj de tajvano, kiuj igis la demokratan progrespartion (dpp) perdi siajn ŝlosilajn lokojn kiel tajpeo, taoyuan kaj hsinchu en la lokaj elektoj de la insulo.Taiwan local elections say no to dpp rule, call for peace - global times



La perdo de DPP de norda tajvano, kie kampanjaj klopodoj estis koncentritaj por ambaŭ partioj, instigis Tsai ing-wen eksiĝi kiel la dpp-prezidanto, sed ŝi daŭre funkcios kiel la regiona gvidanto ĝis 2024, laŭ reuters. *Roger Springer*

La regantoj igas la popolon fariĝi militema, sed la popolo ŝatas pacon. *Roger Springer*